# ESPERANTA FINNLANDO

1960

N:o 8

INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

JARKOLEKTO 1961 — 9 numeroj

Abonprezo enlanda 350 mk
eksterlanda 450 mk
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto 8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj anoncoj): Männikkötie 5 M 67, MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Kaarlo Jokinen, Emil Stenholm.

Redaktejo: Esperantotie 4, MATINKYLÄ (artikoloj, novaĵoj, recenzoj, interŝanĝo de gazetoj)


Ĉiuj esperanto-organizajoj, kluboj kaj societoj estas varme petataj konstante kontribui per novaĵoj kaj interesaj artikoloj, proponoj ktp., por ke nia gazeto estu vera komuna informilo.

## MITEN PERUSTELEMME esperanton opettamista kouluissa?

Kehittyvässä maailmassa kansainväliset kosketukset tulevat päivä päivältä merkittävämmiksi. Ei enää riitä, että kansojen johtomiehet ovat vuorovaikutuksessa keskenään. Ihmisten täytyy saada puhua ihmisten kanssa. Suuri osa oppilaista ei kuitenkaan koskaan saa oppia vierasta kieltä, ja niistäkin, jotka saavat, vain harvat saavuttavat koulussa käytännöllisen kielitaidon.

Esperanton oppii kansakoulunkin oppilas kohtuullisilla ponnistuksilla siihen määrään, että kykenee käyttämään kieltä puheessa ja kirjeenvaihdossa.

Esperanton sanaston runko muodostuu yhteisistä kulttuurisanoista. Suomalaiselle opiskelijalle on suuri voitto siitä, että tämä sanasto tulee hänelle tutunomaiseksi.

Niin helppo kuin esperanton ääntäminen onkin muihin vieraisiin kieliin verrattuna, sen oppiessaan oppii kuitenkin joukon konsonantteja, joita kansanmies ei osaa. Täten helpottuu sekä sivistyssanojen että maantieteellisen nimistön oppiminen.

Esperanon selvä ja looginen kielioppi, latinaispohjainen sanavarasto ja nopea opittavuus tekevät siitä erinomaisen ensi askelen vieraiden kielten oppimiseen. Tämän johdosta esperanton opiskeluun käytetty aika tulee kokonaan hyödyksi muidenkin aineiden opiskelulle. Se ei merkitse kielten opiskelun lisäkuormitusta vaan keventämistä. Onpa esperanton opiskelun huomattu edistävän äidinkielenkin hallitsemista.

## INSTRUISTOJ KAJ KURSGVIDANTOJ

Ni dediĉas rimarkindan parton de ĉi tiu numero al vi. Ni bone scias, ke por ĉi tiu lerneja jaro jam estas tro malfrue efektivigi ĉion, kio estas atingebla. Tamen, studcirklojn vi ankoraŭ povas fondi, kaj antaŭ ĉio: vi kiuj ne estas certa pri propra kapablo instrui, povas plibonigi vian lingvoscion ĝis venonta aŭtuno, se vi nun sufiĉe frue komencas. Aliparte, la enkonduko de Esperanto en lernejojn postulas fruan ekagon. Estas necese venki la simpation de la lerneja estrado, turni sin al la Instrua Administracio sufiĉe frue, ktp.

Do, bonvolu atente studi la artikolojn en ĉi tiu numero !

Ni deziras al vi plenan prosperon en la komuna laboro.

La redakcio.

# ESPERANTO EN LERNEJOJN

Kion ni povas fari?

Kion ni povas kaj kiel ni devas procedi por enkonduki Esperanton? Por povi precize respondi al ĉi tiuj demandoj ni turnis nin al la Instrua Administracio, intervjuante tri aŭtoritatajn personojn: la direktoron de elementa instruado (koulutoimen johtaja) A. Salmela, kaj la lernejajn konsilantojn en la lingva fako, doktoron E. Pennanen kaj sron O. Sampola. Tuj ni diru, ke ili — kiel ĉiam — akceptis nin plej afable kaj rilatis al niaj problemoj kun simpatio kaj helpemo. Nun sekvos la rezultoj de la intervjuoj.

**Studocirkloj.** Unue ni volas akcenti, ke ĉi tio ne koncernas la studocirklojn. Tiajn oni ja povas fondi kie ajn, sub precize samaj kondiĉoj por Esperanto kiel por aliaj temoj de studado. Se la leganto ne konas tiujn, li turnu sin al kiu ajn instruisto kun la demando, kaj li ricevos detalan informon. Ni studas ĉi tie la enkondukon de Esperanto en la lernejan planon de diversaj lernejoj.

**Elementaj lernejoj.** La leĝo permesas enkondukon de maksimume du studobjektoj ekster ja leĝe difinitaj, kun maksimume 4 semajnaj lecionoj kune. Tio signifas, ke oni rajtas enkonduki Esperanton kun 4 semajnaj lecionoj en la kadro de la instrua plano, sed libervolaj. La leĝo ne difinas la minimuman nombron de lernantoj, sed ŝtata subvencio por pagi la instruon estas donebla nur, se ne okazas »malŝparo». Komparante kun aliaj difinoj en la leĝo, tio estas komprenenda tiel, ke ekzistas nenia dubo pri ricevo de la subvencio, se estas 13 lernantoj, sed ĝenerale ĝi estas donata jam en okazo de minimume 8 lernantoj. Ĉi tiu instruo estas permesata en kiu ajn klaso de la elementa lernejo, kaj eĉ estas preferata, ke ĝi daŭru dum pluraj jaroj por la samaj lernantoj.

**(Rekomendo de la redakcio:** La plej bonan servon al nia lingvo vi faras, se vi enkondukas E-n kun po 4 semajnaj lecionoj ekz. komencante de la 3-a klaso ĝis la fino de la elementa lernejo).

Speciale direktoro Salmela diris, ke estas tute aprobinda kaj la studplano de T. Aurela en Pori: dividi la 3-an klason en du grupojn, el kiuj la pli progresintaj lernas E-n, dum la aliaj ricevas plian ekzercon en la gepatra lingvo.

**La procedo** de enkonduko estas jena: La direktisto-instruisto faras studprogramon kaj prezentas ĝin al la lerneja estraro. La estraro rajtas proponi (per motivita opiniesprimo) la malakcepton de la programo, en kiu okazo la lerneja inspektoro decidas. La instruisto rajtas apeli al la Instrua Administracio (Kouluhallitus) — kaj ĝi ja favoras la enkondukon de libervolaj fakoj, kiuj baziĝas sur aparta, persona intereso de la instruisto, kaj precipe de E-o.

Kiel dirite, la instruisto estas salajrata same kiel pro alia instrua laboro.

**Civitana lernejo** (Kansalaiskoulu = duagrada popollernejo). Laŭ la leĝo oni rajtas enkonduki »kelkajn aliajn (en laŭ leĝo postulatajn) studobjektojn, kun negranda nombro de lecionoj». Tio signifas, ke E-o estas enkondukebla kun 2—4 lecionoj ĉiusemajne. Ekster tio, se en la lernejo estas t.n. komerca linio, oni rajtas meti en la studprogramon inter la ĉefaj studobjektoj praktike utiligeblan fakon (kun granda nombro da lecionoj). Kiel tia estas aplikebla la instruo de E-o ekz. kiel alternativa kun la angla lingvo.

(Rekomendo de la redakcio: nepre uzu ĉi tiun eblecon! kaj precipe, se vi instruis E-n en superaj klasoj de elementa lernejo, daŭrigu la instruon de samaj lernantoj en la civitana lernejo!)

**Istruista seminario.** Ĝi ja estus la ŝlosilo por malfermi la pordon per eduko de pli multaj instruistoj. Bedaŭrinde la edikto koncerna estas nefavora: Regule oni rajtas instrui nur la du hejmajn lingvojn aŭ la gepatran lingvon kaj unu aŭ du fremdajn lingvojn, kaj el tiuj nur germanan aŭ anglan! Kompreneble, studcirklojn oni rajtas fondi, ekster la kadro de la programo, se la estontaj instruistoj havas intereson kaj sufiĉan liberan tempon — kio ja estis fakto en kelkaj seminarioj. Kaj restas ankoraŭ unu ebleco, dependanta de la intereso de la rektoro: oni povas fondi eksperimentan alternativan linion, kun instrua programo malsimila ol la regula. Kaj tio signifas la rajton aranĝi linion, kie oni instruas E-n kiel sola fremda lingvo aŭ kiel dua fremda lingvo.

**(Rimarko:** Ni akcentas la gravecon de ĉi tiu punkto kaj esperas, ke troviĝos persono, kiu volos, simile kiel rektoro Vilkki en Somero, eksperimenti per E-o en ĉi tiu kadro).

**Meza Lernejo** (oppikoulu).

Ŝtataj lernejoj estas escepto. La enkonduko de E-o en ilin postulus sanĝon de la edikto, kiu ne estas nun atingebla.

Privataj lernejoj. La Instrua Administracio favoras instruajn provojn — postulante, ke la rektoro, kiu efektivigas tiajn, poste faru referaton pri la rezultoj. La lernejo, kiu en tia celo instruas esperanton, ricevas ŝtatan subvencion por la salajro de koncerna instruisto, se li havas la ĝeneralan instruistan kompetentecon. Per la efektivigo de ĉi tiaj provoj estas eble veni al konstanta instruado de E-o, ekzemple laŭ plano de

 *Kaikkien kirjoitustemme käyttö on vapaa*

Somero, kaj tiu estas nun la plej certa vojo al progreso: el ĉi tiuj lernantoj kreskas i.a. instruistoj, kiuj siaparte daŭrigos la laboron.

Du vojoj rekomendindaj ekzistas: tiu de Somero kaj la instruo de la liceaj klasoj. La plano de Somero ja estas (aŭ devus esti) sufiĉe konata: en la unua klaso (10-jaruloj) 6 semajnaj lecionoj pri E-o, en la 4 sekvaj klasoj instruo de geografio per E-o, ĉe kio geografio ricevas en la 2a kaj 3a klaso unu horon pli, por kompensi tion, ke geografio ne estas instruata per la propra lingvo de la infanoj. Entute tion signifas 6+5+5+4+4 = 24 semajnaj lecionoj pri aŭ per E-o en la meza lernejo.

**Liceo** (lukio), la supera parto de la meza lernejo, kondukanta al universitato aŭ alia altlernejo). Tie E-o estas enkondukebla kiel alternativa fako apud alia fremda lingvo. Sed ĉar en la t.n. reala linio oni instruas, krom la devigaj enlandaj lingvoj, du fremdajn lingvojn, anglan kaj germanan, ni apenaŭ povas esperi, ke troviĝos lernantoj, kiuj volonte lernos nur unu el tiuj (nur anglan aŭ nur germanan, nome la »ĉefan» fremdlingvan fakon en tiu lernejo), kaj anstataŭ la dua E-on. Pli facila la efektivigo estas en lernejo, kie ekzistas »lingva linio», kun latino kiel la tria. Tie oni povas fondi apudan linion kun E-o kiel la tria lingvo. Kiam tio efektiviĝos, ekzistas la ebleco ekzameniĝi en la abiturienta ekzameno en E-o, eĉ inter la skribaj provoj, per kio oni atingas plian poenton en la abiturientan ateston —kio ja povas esti alloga al la lernantoj, ĉar responda sukceso en latina lingvo estas malfacile atingebla.

Ni precipe esperus, ke ĉi tiu plano efektiviĝu en lernejo, kie la plano de Somero estas efektivigita en la mezlernejaj klasoj.

La instruo de E-o do okazus kun po 5 (eble ie po 4) lecionoj ĉiusemajne dum tri jaroj (16—18 jaruloj).

Ŝtata snbvencio por la salajro de la instruisto ricevota, se li estas formale kompetenta.

**La procedo:** La rektoro proponas ŝanĝon de stuldplano en kunveno de la lerneja estraro. Propono pri la ŝanĝo, en la nomo de la estraro, sendota al Instrua Administracio (Kouluhallitus) kun informo pri klasoj, nombro de lecionoj, karaktero (ĉefa, elektebla aŭ libervola fako), motivo pri la neceso aŭ utilo, takso de la nombro de lernontoj, ebleco ricevi instruiston, informo pri uzota lernolibro, informo pri tio, ĉu temas pri eksperimento. (Ĉiu nebagatela ŝanĝo de programo estas konsiderota kiel eksperimento).

**Studplano kaj lernolibro.** Lernolibroj aprobitaj de la Instrua Administracio: Vilho Setälä, Esperanto-kurso (por elementa instruo). Vilho Setälä, Valtatie kielitaitoon (por uzo en ĉiuj finnlingvaj lernejoj, elementaj kaj mezaj), Raka vägen till språkkunskap (por la mezaj lernejoj svedlingvaj) /t.e. Privilegia vojo al Lingvoscio, en finna kaj sveda eksterajo/. Por elementa instruo en popollernejo aŭ en la unuaj klasoj de mezlernejo ni rekomendas komencon per parola instruo sen lernolibro, daŭrigon per lernolibro. Por la liceaj mag. Setälä preparis proponon de studplano, kiun ni volonte sendos al ĉiu deziranto. Ĝi estas aprobita provizore por la tri blindaj junuloj, kiuj jam studas e=on por la abiturienta ekzameno (kun kelkaj modifoj rilate al verkoj riceveblaj en blindskribo), kaj havas bonan ŝancon esti aprobota ankaŭ por instruado en klaso.

**Kompetenteco.** Formala kompetenteco de popollerneja aŭ eventuale mezlerneja instruisto estas ĝenerale postulata kiel kondiĉo por la koncerna ŝtata subvencio, sed ne estas nepra kondiĉo por permeso de instruado de E-o. Krom tio estas postulata faka kompetenteco, montrota ekz. per atesto de Esperanto-Instituto de Finnlando. Tamen oni ne estis tre rigoraj en tiu postulo, pro tio, ke instruisto povas rapide lerni la lingvon, eĉ konkure kun siaj lernantoj. Por la instruistoj, kiuj mem dubas pri sia kapablo ni speciale rekomendas la sonbendan kurson (laŭ Privilegia vojo), pri kiu estis noto en pasinta numero de EF. La bildstria-sonbenda kurso kostas kompleta 4500 mk, sed se vi havas la eblecon kopii la sonbendon (per uzo de du magnetofonoj), vi povas ŝpari iom.

**Resumo.** Laŭ la leĝo kaj pro la favora sinteno de la oficialuloj ekzistas bonegaj premisoj progresigi la instruadon de E-o en Finnlando. La decida punkto estas la trovo de instruistoj. Tamen, se ĉiu instruisto, kiu lernis nian lingvon, utiligos en sia lernejo ĉi tiujn eblecojn, la rezulto jam estus honorinda. Pripensu tion, ekagu kaj gajnu novajn interesiĝantojn inter viaj konatuloj-instruistoj. Vi kondukos nin al fina venko!

V.S.

**ESPERANTA FINNLANDO**

**maksaa vuosikerralta**

**1961**

**vain 350:—, se on takuulla sen arvoinen!**

## MISSÄ ESPERANTOA OPETETAAN

Esperanton opetus kouluissa saa yhä enemmän alaa. UEA on pannut toimeen tiedustelun tämän opetuksen laajuudesta, ja tästä olemme saaneet välitiedoituksen. Tähänastinen tilasto on tosin kovin puutteellinen. Se perustuu opettajien itsensä antamiin tietoihin, ja kovin monet ovat laiminlyöneet näiden antamisen. Niinpä tilastossa mainitaan vain kolme koulua Suomesta (Somero, Turku ja Kokemäki), vaikka tiedämme omassa lehdessämme julkaistuista uutisista, että niitä on vähintään 10. Samoin olemme saaneet varman tiedon Jugoslavian 119 koulusta, joista kuitenkin vain 16 sisältyy tilastoon.

Tilastossa mainitaan kaikkiaan 165 koulua 25 maasta. Näistä 93:ssa opeus on »virallista» tai kuuluu varsinaiseen opetusohjelmaan. Enimmin mainitaan kouluja seuraavista 5 maasta: Ranska (49), Englanti (20), Jugoslavia (16), Kreikka (11) ja Saksa (10). Oppilaita on yhteensä yli 7500, näistä lähes 4000 tyttöjä.

On erittäin tärkeätä täydentää tämä tilasto. Kehoitamme siksi kaikkia, joka ovat opettaneet esperantoa koulussa lukuvuonna 1959—1960 tai opettavat sitä nyt alkaneena lukuvuonna, lähettämään tiedot (kummastakin lukuvuodesta erikseen) EF:n toimitukselle. Me toimitamme ne edelleen UEA:n tilastoijalle.

Seuraavat tiedot pyydetään: Paikkakunta ja koulun nimi, Taso (kansak., oppik., korkeakoulu), Oppilaat (poikia, tyttöjä, molempia), Opetus: a) virallinen vai epävirallinen, b) pakollinen vai vapaaehtoinen, c) kuuluuko lukujärjestykseen, Opettajan nimi ja osoite.

Kuten edellisestä selviää, on myös koululaisille järjestetyt vapaat esperanton opintokerhot mainittava.

Näytteeksi mainittakoon mitä väliaikainen tilasto sanoo Suomesta:

Somero: oppik., yhteisk. 13+23 oppilasta (1958—9?), virallinen, pakollinen, lukujärjestyksessä — 12 vuotta. J. Vilkki.

Turku: kansak., yhteisk., 16+14 opp., virall., vapaaeht., lukujärjestyksessä — 1 v. J. Ahomäki. Vapaaopisto Aurala, Aino Kavenius, Työväenopisto, P. Riihivaara.

Kokemäki: oppik., yhteisk., 6+1 opp., epäv., vap., ei lukujärj., E. Soini.

**Huomautus:** Somerolla on tänä vuonna esperantoa 3:lla luokalla, oppilasmäärät eivät ole tiedossamme, muuten kuten edellä, mutta ulkomainen opettaja.

---

### ESPERANTO EN DANAJ LERNEJOJ

Ni ricevis »tre koncizan» raporton pri la temo. Ĝi tamen ampleksas 7 densajn paĝon maŝinskribite. Ni povas redoni el ĝi nur mallongan ekstrakton, kiu sekvos, pro certaj kaŭzoj, en finna lingvo.

**Esperanto Tanskan kouluissa.**

Tanskassa on mahdollista saada E. lukujärjestykseen paikallisten viranomaisten suostumuksella, sen jälkeen kuin sen on vahvistanut ylempi kouluviranomainen (eri kouluhallitus maalaiskunnilla, ja Kööpenhaminalla, tai opetusministeri). Opetus voi olla joko pakollinen tai vapaaehtoinen; viimemainittu merkitsee kaikkien vanhempien suostumusta. Sen lisäksi voi kouluun saada valinnaisen aineen, opetusministerin luvalla, ylemmällä asteella vaihtoehtoisena ranskan kanssa. Edelleen kokeen nimellä eri asteilla. Toteutus siis riippuu suuressa määrin henkilöistä. Nykyinen opetusministeri on suopea asialle.

**Nykytilanne.** 1960—61 esperanto on 4:n koulun virallisena opetusaineena: 1. **Fredrikshavnin** keskikoulu. 4 viikkotuntia ylimmällä (10.) luokalla vaihtoehtoisena ranskan kanssa. 2. **Kööpenhamina,** Vibenshus skole, Virallinen vapaaehtoinen koeopetus, kolmatta vuotta, osana maantiedon opetusta, 2 tuntia viikossa 4 luokalla. Tästä on ilmestynyt yksityiskohtainen selostus »Dansk Esperanto-Blad'issa». — 3. **Kööpenhamina,** Randergaden koulu. Opetus samanlainen kuin edellä, 3- tai 4:llä luokalla (15 vuotiaille). — **Odense,** Risingvejens skole. Koeopetus kahdella perättäisellä luokalla, tunti viikossa, valtion kasvatusopillisen korkeakoulun johdolla.

Edellisten lisäksi esperantoa opetetaan eräissä kouluissa epävirallisesti (tarkemmat tiedot puuttuvat). Kaikkia mainittuja virallisia opetuksia on edeltänyt vapaaehtoinen kerho-opiskelu samassa koulussa.



## GRAJNOJ EN VENTO-ALBUMI

kutsuu suomalaisia esp.opettajia ja esp. kerhojen johtajia avustajikseen. Jo kahden kansakoulun esp.kerhot Suomessa avustavat albumia, nim. Rauvolan koulu, Turku 16:sta ja Pispan koulu, Tampereelta.

Toistamme jälleen, että kirjoitusten ei tarvitse olla loistavia. Vain tavallisen suomalaisen lapsen kertomia kokemuksia oman pienen maailmansa piiristä lapsenomaisesti kuvitettuna. Lapsen ei näitä tarvitse esperantontaa. Sen tekee opettaja tai ohjaaja. Suomen opettajain Esperantoliiton monistuskone Pispalassa, Pispalanharju 13:ssa monistaa kirjoitukset kuvineen. Sieltä ne 30 kpl sarjoina lähetetään albumien kokoamispaikalle Ranskaan. Näin koottu albumi lähetetään avustajille eri puolille maapalloa.

Suomeen on tullut tähän asti vain yhdelle koululle albumi, mutta Rauvolan koulu on päättänyt toimia niin, että sekin saisi omansa. Sillä on hyvät mahdollisuudet. Onhan sen opettaja, Jorma Ahomäki, saanut tarkastajan hyväksymään lukujärjestyksen, jossa on vallan neljä tuntia viikossa koko luokalle esperantoa.

Tämä nuori, esperantoaatteen täysin omaksunut, korkeakoulutietä valmistunut opettaja voi lainata Grajnoj en Vento-albumia Turun ympäristön kerhoille, ja Pispan koulun esperantokerhojen albumi on Tampereen ympäristön esp.kerhojen käytettävissä. Näin uudet albumit nopeasti saavuttavat lukijakuntansa. Lisäksi Suomen Opettajain Esperantoliitto voi lainata albumeja kaikkialle Suomessa.

Grajnoj en Vento-toiminnan laajentuessa herää kysymys oman suomalaisen albumin toimittamisesta. Tätä voitaisiin monistaa kaikille kerhoille, jopa kerhonjäsenetkin voisivat sen tilata.

Asiaa voisi kehitellä vieläkin pitemmälle, mutta emme halua niin paljon lentää tosiasioiden edelle. Nyt olisi tärkeätä, että Turun ja Tampereen tapaisia lainauspisteitä saataisiin lisää.

Pori, Jyväskylä, Somero, Hamina ja muut! Missä hyvänsä esperantokerhoja on. Herätys! Tulkaa kaikki mukaan!

Kas näin kirjoittaa brasilialainen omasta maastaan:

### Brazilo

La lando, kie mi naskiĝis, estas tre bela. Se en la pasinteco vere ekzistis paradizo, ĝi certe estis en Brazilo.

La aspekto de Brazilo estas entute tre agrabla.

La ĉielo estas konstante blua, ĝiaj senmezuraj praarbaroj brilas en tre bela verdkoloro.

Ŝajnas, ke ĉi tie la suno estas plej brila, la luno plej hela kaj plej amika.

La klimato ne suferas ŝanĝojn tiel fortajn kiel en la plej multo de la aliaj landoj.

En mia ŝatata Brazilo estas floroj dum ĉiuj monatoj de la jaro.

Oni ankaŭ vidas belajn papiliojn ornamantaj la aeron, kaj estas birdoj, kiuj plezurigas nian animon per siaj dolĉaj kantoj. Nia lando ĉiam havas malfermitajn brakojn por ĉiu persono, kiu volas ĉe ni konstrui sian loĝejon por ĝui niajn plezurojn kaj afablecon de la brazilanoj.

Lernantino: Marilete Dutra Baslos, 15-jara.

Lernejo: Esp.-Kurso en Niferoi Esp.-Klubo.


**YK:n eli Yhdistyneitten Kansakuntien 15-vuotispäivälle omistettu**

# ESPERANTISTIEN JUHLA

**pidetään Helsingissä, Balderin salissa, Aleksanterinkatu 12, marraskuun 17 pnä klo 19.00. Tervetuloa.**

**Suomen Esperanto-opisto**

# AUTUNAJ PENSOJ

**La modernaj tempoj,** oni povas motivite diri, estas saturitaj per internaciaj fenomenoj kaj internacia pensmaniero. Preskaŭ ĉiuj homoj estas pere aŭ senpere membroj de unu aŭ alia internacia organizo. Se vi estas ano de iu idealisma asocio, aŭ se vi simple estas membro de via sindikata sekcio, vi povas esti certa, ke, se vi mem ne estas, via asocio tamen estas membro de respektiva internacia organizo. Pri tio oni nature ne povas diri ion negativan, tute kontraŭe. Sed la nuntempa internaciismo montriĝas ankaŭ en aliaj, pli nekontentigaj formoj. La junularo, precipe en urboj kaj urbegoj, trovis sian novan »linion», linion de kvazaŭkrimuloj. Mi ne scias, de kie tia movado, — ĉar pri vera movado oni povas paroli —, devenas origine, sed tamen oni povas konstati, ke la simptomoj estas ĉie videblaj. Ni havis en Helsinki antaŭ nelonge filmon pri la temo, estis sveda filmo, nomata »Raggare». Ĝi estis bona filmo, kvankam ĝi lasis iom artefaritan kaj sensacian postguston. Nature oni devas kompreni, ke la filmoproduktisto devis sian laboron fari laŭ komercaj principoj, tial la sensaciismo. Estis spite de tio bona filmo, lasante nenian dubon koncerne la nuntempan stadion de urbega junularo. Aŭto estas idolo, se vi estas juna viro kun aŭto, vi povas libere elekti kian ajn knabinon por via distro. Oni serĉas nur tion, kion oni en nuntempa ĵargono nomas »cheap thrill», ian neprofundan kaj efemeran ekscitigon, kaj tio estas ĉio. Oni foriras de kinejo kun la penso, ke devas esti terura la junularo en Stokholmo. Se ni pensas pri la problemo iom pli profunde, ni tuj konstatas, ke estas nur etagrada diferenco inter ili kaj nia propra junularo. Kia estas tiu malgranda diferenco? Eble nur tia, ke ĉe ni la nombro de aŭtoj estas pli malgranda, kaj la ĉefaj veturiloj estas mopedoj kaj motorcikloj. La cetera bildo estas tre simila, terure simila. Kaj tie estas malbela bildo pri la nuntempa internaciismo, kies ĉefa aspekto estas nur sensenca imitado de aliaj. Se ekster la landlimoj okazas ia speciala, kiel antaŭ kelkaj jaroj okazis, ke kelkaj junaj homoj, aŭdinte novajn »Rock'n Roll» melodiojn en la kinejo, falis en trancon, kriante, kriegante, tuj ankaŭ la niaj laŭeble imagis kaj imitis tian konduton, eĉ se ili certe neniel havis bezonon por tio.

Komunikiloj, tie estas klarigo al la nuntempa internaciismo. Oni povas en kelkaj horoj transflugi la tutan Eŭropon, kaj en la radio kaj televido oni eĉ en pli mallonga tempo povas kunvivi okazaĵoj de aliaj popoloj. Tio estas tre bone, sed ĉio ĉi tio postulas ankaŭ, ke oni havu iel selektivan menson. La translima interŝanĝo de programoj kaj scioj ne estas nure bona kaj evoluiga afero. La radioelsendoj estas tiel saturitaj per tendencoj kaj celscia propagando, ke oni estu tre singardaj aŭskultante tion. Certe estas, ke tiaj landoj kiuj kun plej aŭdebla bruo tamburas pri bonaj cirkonstancoj kaj alta nivelo de vivado, plej ofte havas ion kaŝendan, ĉar ofte oni povas ankaŭ konstati, ke en tiuj landoj oni ne donas al eksterlandaj turistoj plenan liberon de sinmovo. Eĉ estas konstatinde, ke oni ne povas ĉiam ricevi vizon por vojaĝo en iun landon, se oni scipovas la lingvon de tiu lando! Tio estas jam absurde, kiam samtempe la koncerna lando multe kaj laŭte propagandadas pri homa libereco. Nu, tio nur, por ke ni ĉiuj estu tre singardaj estante celoj de fremda informado.

**En la tempo de Zamenhof** estis la aferoj tute alispecaj. Ne ekzistis tiaj teknikaj iloj kiel nun. La landlimoj estis tamen landlimoj, kaj Zamenhof, konstruante nian lingvon, celis al internacia, interpopola, kompreno. Estas feliĉe, ke Zamenhof ne vivis ĝis

centjara, ĉar al li certe estus granda sufero konstati, ke la mondo nun estas vere tre internacia, eĉ eble en plia grado ol li iam imagis, sed la homa interkompreno estas multe pli malfacile akirebla ol tiam. En liaj tempoj oni povis vojaĝi el lando al lando, ofte sen pasportoj, kaj se oni bezonis tiun, la vojaĝado tamen certe ne estis tiel restriktita ol nuntempe. Kaj en tiaj cirkonstancoj Zamenhof sentis sin devigata konstrui al la mondo novan, komunan lingvon. La homaro ne evoluis post lia tempo, ĝi malevoluis. Oni eltrovis ĉiajn teknikaĵojn, unuj pli mirindaj ol la aliaj, sed la homa interkompreno ne pliboniĝis, tute kontraŭe. Ni nun nur atendas, kiam la sekvanta, la tria, mondmilito komenciĝos, ni ĉiuj estas certaj, ke ĝi devos komenciĝi. Zamenhof oferis sian personan vivon, li ellasis sian materian prosperon, fariĝante unuavice la kreinto kaj porbatalanto de Esperanto, kaj nur duavice kuracisto. Tial li neniam povis ricevi materie stabilan pozicion en la societo. Li ja estis kuracisto, okulisto. Oni povas kun humila danko imagi Zamenhof sidanta ĉe sia tablo, verkante, skribante, en la lumo de primitiva olelampo, sciante -kiel okulisto- ke tio devas esti malbone al liaj okuloj. Sed li kontinuis, kaj finis sian laboron. Oni ricevas rideton al la vizaĝo pensante pri la ĝojo de Zamenhof, kiam li en la unuaj tempoj ricevis eksterlandajn leterojn kaj el ili povis konstati, ke lia lingvo vere funkcias. La poŝto funkciis en tiuj tempoj nature malrapide, sed la atento de respondo al iu aŭ alia letero estis al li kredeble streĉa kaj ekscitiga afero. Li havis sian celon, kaj li laboris por akiri ĝin, afero kiu estas tute fremda al la nuntempa huligana parto de junularo. (Estas nature multe da nehuliganismaj junuloj, pri ili oni povas diri nur bonajn aferojn, ĉar devas postuli kuraĝon resti normala kaj natura inter tiel fortaj kontraŭaj influoj.)

**Ĉarma penso** estus, ke ni esperantistoj, ellasus la bruon de nuntempa jazz- kaj rock-saturita internaciismo, kaj metus nin en la pozicion de Zamenhof. Ni kvietiĝu ĉe niaj skribotabloj kaj verku niajn salutojn al niaj amikoj en malproksimaj landoj. Tion farante ni samtempe povos decidi iom da penso ankaŭ por la jam delonge mortinta pola okulisto, kiu antaŭ multaj jaroj sammaniere sidadis ĉe sia tablo. Ni estas pli feliĉaj ol li: ni havas kontentigan lumigon, ni ne devas difekti niajn okulojn per skribado en nesufiĉa lumo. Kaj antaŭ ĉio, ni jam havas la lingvon, ni ne devas ĝin konstrui. Al ni estas lasita nur la ĉarma parto de afero: ĝui pri la internacia korespondado. Kiam la letero estas en la poŝtkesto, ni havas tempon iom legadi. Tie estas ankaŭ afero, pri kio oni povus paroli kiel longe ajn. Kial ni esperantistoj estas tiel maldiligentaj legantoj? Ni ja legadas, sed niajn nacilingvajn librojn. Kial ne esperantajn? En esperanto ekzistas tre multe da bona kaj amuza literaturo, oni vere povas ĝui pri ĝi.Ĉu estus tro multe sugesti, ke ni ĉiuj, se ni ne posedas jam, aĉetu la ĉefverkon de nia literaturo, la Fundamentan Krestomation de Zamenhof. Ĝi estas havebla en tre eleganta eksteraĵo, en verda bindaĵo. Tie estus libro, kiun oni kun fiereco povas montri al ne-esperantistaj vizitantoj rakontante, ke estas libro, kiun la kreinto de internacia lingvo mem kompilis. — Legante oni povas pasigi elegante kelkajn vesperojn en semajno, kaj fine ja alvenos la respondoj de niaj leteroj. Tuj oni respondu, ĉar tie estas unu el la plej aĉaj pekoj de esperantistoj; oni nur tre malfrue respondas al siaj gekorespondantoj. Saman tempon oni pasigas skribante sian leteron, se oni skribas ĝin senatende kiel post longa prokrastado.

Nu, mi nur esperas al ni ĉiuj agrablajn vesperojn kun la leteramikoj kaj bonaj libroj

Arvikolo

## UEA

Delegitoj. — Ĉiu esperantisto scias, kiel grandan rolon ludas en nia movado la delegitoj de nia mondorganizo. Nia jarlibro interalie kun la listo de ĉ. 3000 delegitoj en 65 landoj de la mondo formas ja la plej efikan propagandilon, kiun neniu vera esperantisto povas malhavi. Sed la delegita reto estu ankoraŭ pli vasta por esti eĉ pli efika. Tial mi admonas ĉiun samideanon, en kies loko ankoraŭ ne ekzistas delegito, vic- au fakdelegito (D, VD, FD), ke li bonvolu servi nian aferon fariĝante tia. Petu de mi senprokraste la respondilon de D, VD au FD, legante tamen antaŭ tio la paĝon 135 en la jarlibro 1960. — Se iu el la malnovaj delegitoj rimarkis en la Jarlibro ion korektindan, nepre informu al mi pri ĝi ĝis la fino de novembro, prefere tuj!

Ĉar la nova jarlibro aperos nur en majo 1961, ankoraŭ profitas al tiuj, kiuj ĝis nun ne estas UEA-membroj 1960, pagi la jarkotizon: MJ (Membro kun Jarlibro) 600:— kaj tuj ricevi la ĉi-jaran Jarlibron. Se vi santempe pagos MA-kotizon (MembroAbonanto) por 1961 (ĝis la jarfino 1960 la rabatita kotizo 1.320:—), vi eĉ povas vin proponi kiel iu el la tri delegitspecoj kaj vi havos vian nomon jam en la Jarlibro 1961!

Speciale mi petas la gejunulojn (minimume 18-jarajn) fariĝi junulardelegitoj. Kaj se vi ankoraŭ ne estas eĉ 21-jara, via membrokotizo estas nur la duona: ĉijare 300:— (por 1961 antau 1/1-61 330:—) kaj MA por 1961 660:—, kaj tamen vi ricevos la samon kiel la plenaĝulo: la rajton uzi la servon de ĉiuj delegitoj en la mondo, MJ la jarlibron kaj MA aldone ankaŭ ĉiumonate la interesan revuon Esperanto. Ĉiu kiu ne ankoraŭ konas la revuon Esperanto, petu de mi senpagan specimenon kontraŭ la afranko (20:—, ekz. per poŝtkarto kun respondo).

Atentu ankaŭ — speciale la junaj sub 40-50 jaroj — ke vi povas antaŭ la jarfino 1960 fariĝi dumviva membro pagante 24.000:— (poste 27.800:—). Por MS (Membro Subtenanto) vi pagu nun 1980:— (post 1/1-61 2070:—), se vi volas pliforte subteni la movadon!

**Esperanto-kluboj!** Por ke via nomo kun la adreso, kunventempo kaj -loko kaj ebla korespondadreso aperu en la jarlibro 1961, la funkcianto sendu senprokraste la informojn kun la pago 150 mk al mi kaj plejlaste ĝis la fino de novembro.

**Anoncoj por la Jarlibro 1961!** Klopodu varbi de diversaj firmoj de via loko ilin: hoteloj, restoracioj, komercejoj, banlokoj, somerumaj restadejoj, foiroj, turismaj oficejoj ktp. La tutpaĝa anonco kostas 7.500 mk, el kiu ĉiu varbanto rajtas mem teni 500 mk. La duonpaĝa kaj kvaronpaĝa resp. la duonon au kvaronon, same kiel via profito. Varbante ne forgesu diri, ke la jarlibron ricevas pli ol 7000 membroj de UEA en pli ol 80 landoj. — La teksto kaj la eventuala bildo de la anonco, same kiel la mono atingu min antaŭ la fino de novembro.

Kongresaj glumarkoj de la 46a Universala Kongreso de Esperanto en Harrogate (Yorkshire) 5 — 12 VIII 1961 estas riceveblaj de Joel Vilkki. Ili kostas pofolie (25 markoj) 75 mk (+ 10 mk por la sendokostoj de 1 — 5 folioj).

## »ESPERANTO PAROLATA»

Sro M. Rétot Ranskassa toimittaa tämän nimistä julkaisua, johon hän tahtoo saada nimiä ja osoitteita toiminimistä ym., joiden johtaja ja/tai joku virkailija on esperantontaitoinen. Sitä on ilmestynyt jo kaksi painosta ja kolmas on tekeillä.

Siis jos joku hotelli (Luokat $K_1$ ja $K_2$ loisto-, $K_3$ hyvä, $K_4$ tyydyttävä, $K_5$ ei ajanmukainen), ravintola, liike, posti- tai muu toimisto, lääkäri, kampaamo, apteekki, matkatoimisto, sanomalehti, järjestö, kahvila, pankki, antikvariaatti, liikennelaitos, museo, täysihoitola jne. paikkakunnallanne on sellainen, jonka johtaja ja/tai joku virkailija (esim. Te itse) puhuu esperantoa, ilmoittakaa ennen 15/12-60 minulle siitä: nimi, osoite ja esperantoa puhuvan johtajan ja/tai virkailijan nimi. Tämä on täysin maksuton, mutta tekijä toivoo saadakseen julkaisun mahdollisimman halvaksi, avustusta kutakin nimeä kohti esim. 150 mk, jolloin asianomainen saa kappaleen adresaroa ilmaiseksi. Samaan hintaan voi jokainen varata itselleen julkaisun. — Suuryrityksiä, teollisuuslaitoksia, tukkuliikkeitä yms. pyydetään kuitenkin maksamaan 500 mk.

Joel Vilkki
SOMERO
Postisiirtotili: Tu 60 253.

## FLOROJ KAJ BIRDOJ

El ĉinio alvenis belega kajereto de 8 multkoloraj artaj reproduktajoj »Floroj kaj birdoj» en la formo de poŝtkartoj. Dorsflanke esperanta klarigo kaj la nomo de la ĉina artisto. La prezo kun la sendokostoj nur 75 mk. Pagu al mia pĝk. Tu 60 253 kune kun viaj aliaj mendoj kaj pagoj. Joel Vilkki.



Kokemäki 1960 — Satakunnan Maakunta Oy

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL